

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
aprilo-junio 2013

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

La Internacia Jaro de la Kvinoo

Kio estas la kvinoo?

La kvinoo estas “pseŭdo-greno”—tio estas, ĝi estas greno-simila manĝaĵo produktita de planto kiu ne apartenas al la gresofamilio. (Veraj grenoj, kiel la tritiko kaj la rizo, estas la produktoj de gresoj; la kvinoo estas ano de la kenopodia vicfamilio.) Oni produktas kvinoon kiel malsovaĝan planton jam dum 3,000 ĝis 4,000 jaroj en la anda regiono, en la aktualaj landoj Bolivio, Peruo, kaj Ekvatoro. Nun oni produktas ĝin en diversaj mondopartoj.

Kial okazas la Internacia Jaro de la Kvinoo?

---La kvinoo estas nutre grava manĝaĵo. Ĝi enhavas plurajn aminajn acidojn kaj mineralojn. Ĝi ne enhavas glutenon. Ĝi estas facile preparebla, kaj por altigi eĉ pl la nutran valoron de kvinoo, oni povas facile kaj rapide burĝonigi la semojn en akvo.

---La kvinoo estas historie interesa. Inter la inkaoj, oni nomis la kvinoon “la patrino de ĉiuj grenoj”; la inka imperiestro ĉiujare semis la unuajn kvinoo-semojn. Tamen, la fruaj hispanoj en la anda regiono montris malrespekton pri kvinoo, kiel ili montris malrespekton pri multaj aspektoj de la vivoj de la tieaj indiĝenoj kaj indiĝenaj kulturoj.

---La kvinoo nun iĝas pli kaj pli grava rilate tutmondan manĝaĵ-sekurecon kaj la tutmondan ekonomion ĝenerale. Pro la altiĝanta prezo de kvinoo, kelkaj andaj eksbienistoj kiuj devis forlasi la kamparon pro ekonomiaj kialoj nun revenas el urboj al la kamparo por kultivi kvinoon.

Indas la penon serĉi receptojn kaj aliajn informojn pri la kvinoo se tiu manĝaĵo ne estas bone konata en via lando--aŭ en via kuirejo. Kiel estas la veraj grenoj, la kvinoo estas fleksibla manĝaĵo kiu agrable akompanas legomojn, fruktojn, laktaĵon, kaj viandaĵojn.

Estus interese fari diverslingvan liston de la nomoj kiujn la pseŭdogreno havas en diversaj mondopartoj. Por komenci la liston, mi informas ke en la hispana kaj la

angla, la vorto estas “quinoa”.

Kiel oni povas adicii per subtrakti?

Fiŝkaptistoj en la amazona regiono de Brazilo aldonas al siaj monrimedoj per kapti fiŝetojn deziratajn de diverslandaj hobiistoj. Rimarkinde estas ke la fiŝkaptado ne elĉerpas la riveran fiŝetaron; pro tio, la situacio estas daŭrigebla.

En diversaj mondopartoj, oni trovas gentojn aŭ lokajn popolantarojn al kiuj mankas monrimedoj; tiaj homoj kiam ili loĝas en lokoj kie estas petrolo aŭ mineraloj, aŭ kie oni povas bredi bovojn, ofte devas toleri tiajn industriojn pro ekonomiaj kialoj. Tamen, ŝajnas ke la indiĝenaj kaj miksrasaj popolantaroj en la regionoj kie estas la “hobio-fiŝoj” ne devas toleri tian naturo-rimedan rabadon por povi ekzisti ekonomie. Ekzemple, en la “Rio Negro” [Nigra Rivero], la fiŝoj dezirataj de hobiistoj estas tiom multnombraj ke la fiŝkaptistoj povas forpreni multajn sen kaŭzi problemojn. La kialo estas ke en la amazona regiono, la akvokvantoj de la riveroj multe varias, kaj multaj fiŝoj mortas ĉiujare pro akvomanko. Rezulte, la fiŝoj frajas ĝis milojn da ovoj. La fiŝkaptado por hobiaj celoj ne interrompas la drastajn ciklojn de la rivero, kaj eĉ plilongigas la vivojn de kaptitaj fiŝoj. Ankaŭ grava estas tio ke la fiŝoj en la riveroj frajas nature, sed multaj profesiaj fiŝbredistoj per hormonoj frajigas siajn fiŝojn.

Por prezenti la avantaĝojn de la kaptitaj fiŝoj, la “Association of Zoos and Aquariums” [Asocioj de Bestĝardenoj kaj Akvarioj] faras programon por prezenti al tiuj, kiuj aĉetas fiŝojn pro hobiaj celoj.

Lingva noto: En la portugala lingvo de Brazilo, la vorto “piaba” [fiŝeto] havis la kromsignifon “io aŭ iu malgranda kaj negrava”. Sed nun, la fiŝetoj estas gravaj pro pluraj kialoj apud la Rio Negro.

Informofonto: La scienca magazino Discover [Eltrovu], aprilo 2013.

Sabino Romero, industrio, kaj la Patrino Tero

La 3-an de marto 2013, oni murdis gravan anon de la jupka gento de Venezuelo, Sabino Romero. Pro tio ke La Kalumeto aperas nur kvaronjare, ĝi ne povas taŭge raporti pri situacioj kiel tiu de S-ro Romero. Tamen, oni povas rekoni ke la murdo de Romero estas ekzemplo de ofta rezulto de konkurado inter indiĝenoj kaj entreprenistoj aŭ “disvolvistoj,” ekzemple, tiuj, kiuj deziras konstui dikojn.

Ŝajnas ke en la kazo de Sabino Romero, la registaro de Venezuelo penis protekti indiĝenan grupon, sed la entreprenoj (pri minado kaj bestobredado) nek foriris la terenon de la indianoj nek faris aliajn aranĝojn kun ili, kaj la registaro ne insistis pri la afero, eble pro la graveco de la karbo kaj la viando al la tiulanda ekonomio.

Evidentiĝas ke la UNO kaj la NROj estis sen sufiĉaj rimedoj por solvi la situacion. Evidentiĝas ankaŭ ke la mono kiun la venezuela registaro promesis por kompensi la entreprenojn probable ne allogis ilin, ĉar la venezuela valuto jam draste perdis sian internacian valoron. Sangas la indiĝenaj popoloj kaj la ekonomio de la tuta lando; vortoj ne ŝtopas la fluadon.

Komentoj pri tiu situacio kaj similaj estas bonvenaj!

Informofontoj: Diversaj novaĵo-servoj

Kulturesprimado en Havaio

En la revuo *Américas* (junio 2012) de la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, aperis artikolo pri la antaŭa renaskiĝo kaj nuna daŭrigado de gravaj eroj de la indiĝena kulturo de Havaio, vicoŝtato de Usono.

Unu kultura esprimaĵo menciita estas la indiĝena lingvo, kiu preskaŭ malaperis antaŭ la decido de la indiĝenoj de Havaio revivigi ĝin. La alia kulturero tre grava por la indiĝena vivo kaj memesprimado estas la danco "hulohulo," per kiu oni povas rakonti per gestoj. La hulohulo havas ankaŭ lingvan aspekton pro la kantado aŭ ĉantado kiu akompanas la dancandon, ĉu tradician aŭ modernan.

Ne estas surprize ke oni okazigis la kulturan renaskiĝon per labori kun infanoj. La organizintoj de la lingvaj programoj ekinstruis junajn infanojn, tiel ke, post pluraj jaroj, ekzistas studoprogramoj por diversaj aĝoj. Oni rimarku ankaŭ ke skriba formo de la lingvo estas esenca parto de la moderna lingvouzado.

Estas interese pripensi tion, ke kiam la indiĝenaj lingvo kaj dancado reaperis kiel vivantaj kultureroj, iliaj subtenantoj devis forte kontraŭi du gravajn aspektojn de la ĝenerala kulturo de Havaio: en la tiama vicoŝtato (dum la 1970-aj jaroj), la angla estis la sola lingvo per kiu oni rajtas instrui, kaj la hulohulo estis malpermesata pro premado fare de kristanaj grupoj. Malgraŭ tiuj fortaj malavantaĝoj (jam forviŝitaj), la indiĝena kulturo de Havaio sin esprimas pozitive, kreeme, kaj eĉ festece.

"Ni Estas la Mondo"

Jen la titolo de artikolo en la numero por majo-junio 2013 de *Utne Reader*. Ĉu la titolo estas simple troa aŭ ĉu ĝi estas ironia? Vi mem decidu ĉe la fino de ĉi tiu resumo.

La artikolo priteamas laŭleĝan personecon por rivero en Nov-Zelando. Specife, temas pri la Rivero "Whanganui". Pli ĝenerale, ĝi temas pri la malsimileco de la mondoperceptoj de diversaj kulturoj. Laŭ la artikolo, la nov-zelandaj maorioj emas konservi kaj plivalorigi, sed la ne-maorioj de la lando emas industriigi kaj pligrandigi profitojn. Pro tio, la posedado kaj administrado de, ekzemple, rivero estas tre malfacila punkto inter la maorioj kaj aliaj homoj aŭ homgrupoj en Nov-Zelando.

Oni kredas ke leĝa personeco de naturo-rimedo eble estos utila kompromiso. La celo de la leĝa personeco estas la antaŭenigo de la fizikaj, ekologiaj, spiritaj, kaj kulturaj rajtoj de la rivero. La rivero havos du kuratorojn: la tribo whanganui-iwe asignos unu el ili kaj la brita registaro la alian. Oni povas realisme esperi ke la nov-zelanda registaro kaj la tribo whanganui-iwe havos pli pacan rilaton kaj ke la koncepto de leĝa personeco helpas pri similaj situacioj en diversaj landoj kaj per diversaj leĝo-sistemoj.

Informofonto: *Utne Reader* ĉerpis el *Cultural Survival Quarterly* (decembro 2012.)

"Kantoj de la 'Colorado'" (informbendo)

Ĉi tiu informbendo enfokusigas sin je la kanto-cikloj de la indianaj grupoj en sudokcidenta Usono kaj nordokcidenta Meksiko.

La kantojn, kiujn oni nepre laŭvice kantas, oni uzas dum festenoj, ceremonioj, kaj kremacioj. Multaj el la centoj de kantoj nun perdiĝas, kaj la lingvoj en kiuj oni kantas ilin bezonas revivigon. Video-programisto Dan Golding kaptis malkreskantan eron de indiĝena kulturo; oni daŭrigos ĝin nur per komuna kaj forta klopodo instrui kaj lerni la lingvojn kaj lerni pri la kulturoj de tiuj, kiuj antaŭlonge kreis la kanto-ciklojn.

Nepriparolata en la recenzo, sed grava al la sukceso de la projekto de revivigo kaj instruado/lernado, estas la starigo de maniero per kiu oni retrovas la kantojn kaj infuzas ilin je signifo por indiĝenaj junuloj. Tiuj junuloj devas lerni tiujn signifojn per maniero kiu estas pli ol parkera.

Alia pripensinda afero estas ke oni kantas la kantociklojn dum ceremonioj kiuj daŭras tutnokte. Ĉu la horarojn de butikoj, lernejoj, kaj fabrikoj oni povas akordigi kun tutnoktaj ceremonioj? Ĉi tiu projekto klare montras kelkajn el la malfacilaĵoj kiujn indiĝenaj popoloj kaj individuoj devas fronti kiam ili havas piedojn en du kulturoj.

Informofonto: Neŭs from Native America, printempo 2012.

Modernaj maskoj

En la konata revuo National Geographic (Usono) de aprilo 2012, aperis okulfrapa bild-artikolo pri maskoj. Temas ne pri la konataj afrikaj maskoj en muzeoj, sed pri la modernaj maskoj kaj vizaĝa/korpa farbado de Afriko kaj Hajtio. Ankoraŭ ekzistas en kelkaj afrikaj landoj kaj en Hajtio la antikva kutimo de la vera maskerado, en kiu gravaj, simbolaj estaĵoj videbliĝas en socioj. Laŭ la kredaroj de diversaj kulturoj, per surmeti maskon, oni surmetas ankaŭ la personecon aŭ esencon de besto, spirita estaĵo, kultura estaĵo, kaj tiel plu. (Oni ankaŭ eniras spiritan mondon kies potenco postulas ke la enirantoj estu nur viroj.)

La imagopovo de la maskofaristoj estas rimarkinda, kaj estas aparte interese rimarki ke la faristoj uzas materialojn kaj tradiciajn kaj modernajn; ekzemple, brilajn kristnaskofestajn ornamojn kaj diversajn modernajn ŝtofojn kaj gantojn. La rezulto estas ambaŭ historia kaj aktuala.

La artikolo ĝojigas min pro tio ke mi vidas ke la mask-tradicioj de almenaŭ kelkaj landoj kaj gentoj ankoraŭ floras. La maskoj ne nur atendas nin en muzeoj aŭ kaŝas sin en privataj kolektoj, sed surstrate dancas kaj dancigas, ĝojas kaj ĝojigas, esprimas sin kaj responde esprimigas aliulojn.

“La Rizo kaj la Sukerkano”

Popola rakonto el Madagaskaro, mallongigita kaj enesperantigita el la libro Folk Tales of All Nations fare de F. H. Lee.

Sukerkano alparolis Rizon por proponi ke ili amikiĝu; la kialoj estis ke ili ambaŭ originis en la tero kaj ke ili samsortis pro sia perhoma rikoltado kaj uzado. Fakte, komentis Sukerkano, iliaj nomoj, rizo (“vary” en la malagasa) kaj sukerkano (“fary” en la sama lingvo) multe similis.

Rizo respondis ke pravus ke ĝi kaj Sukerkano originis en la tero kaj ke ili similis ankaŭ pro tio ke homoj rikoltis ilin kaj uzis ilin. Tamen, Rizo malakceptis la amikecoferon kiun Sukerkano faris pro la malsimileco kiun ĝi trovis en la vivoj de la

du plantoj.

Rizo klarigis al Sukerkano ke ĝi restas rizo kiam oni plantas ĝin; ĝi restas rizo kiam ĝi ĝermas; ĝi restas rizo kiam oni transplantas ĝin; ĝi restas rizo kiam oni

rikoltas ĝin; ĝi restas rizo kiam oni sekigas ĝin; ĝi restas rizo kiam oni staplas ĝin; ĝi restas rizo kiam oni kuiras ĝin kaj kiam oni manĝas ĝin.

Rizo plu klarigis ke sukerkano restas sukerkano kiam oni metas kanopecon en la teron por ke ĝi elsendu ŝosojn; ĝi restas sukerkano kiam ĝi kreskas; ĝi restas sukerkano kiam oni rikoltas ĝin; ĝi restas sukerkano kiam oni prem-eligas la kan-sukon. Tamen, komentis la rizo, la sukero kiun oni faras el la suko ne estas sukerkano, kaj la rumo kiun oni faras el la suko ne estas sukerkano. Pro tiu grava malsimileco, komentis Rizo, la du plantoj ne povas amikiĝi.

La enhavo

"La manĝaĵo estas en la valo,

en la maro, en la sankta domo de Pele*,

en la arbaro.

se la sek-kukurba ujo ja malplenas,

tiam, plenigu ĝin je vivodona materio."

Ĉanto fare de Pualani Kanaka'ole Kanahele, havaia poetino kaj dancistino de la hulo-hulo.

Komento de Lorilani Keohokalole, studentino de Pualani Kanaka'ole Kanahele: "[La ĉanto] deklaras ke mi estas la sek-kukurba ujo. La manĝaĵoj estas ĉie ĉirkaŭ mi, en la valo, la maro, en la sankta domo de Pele, kaj en la arbaro. Estas mia respondeco plenigi min je tiuj manĝaĵoj. Manĝaĵoj povas esti bestodevenaj aŭ plantodevenaj, aŭ ĝi povas signifi edukado aŭ kultura/spirita vekiĝo."

Pele estas la havaia diino de vulkanoj.

Ambaŭ citaĵoj estas el la anglalingva libro Ho-okupu: Oferto de Literaturo fare de indiĝenaj Havaiaj Virinoj (2009)

Infaneco en inuitaj kulturoj:

"Kiom peza le estas!"

Kanto de inuitaj virinoj pri siaj virfiloj....

Estas mia granda bebo

Kiun mi sentas en mia kapuĉo.

Ho, kiom peza li estas!

Ja ja! Ja ja!

Kiam mi turnas mian kapon,

Li ridetas al mi, mia
etulo. Bone kaŝita en mia kapuĉo.

Ho, kiom peza li estas!

Ja ja! Ja ja!

Kiom li estas dolĉa kiam li ridetas;

Li havas du dentojn kiel rosmareto.

Ho, plaĉas al mi ke li estas peza
Kaj ke mia kapuĉo estas plena.

Fonto: Literatures of the American Indian, fare de A. Lavonne Broŭn Ruoff.

La nordlumaj infanoj

Jen inuita rakonto kiu meritas nian atenton pro siaj mesaĝoj pri la beleco de la naturo kaj la graveco de tiu beleco, kaj pri la rilato inter enkorpigataj kaj spiritaj estaĵoj.

Iam estis inuita ĉasisto kiu trovis ke li senĉese perdis la viandon de la bestoj kiujn li mortigis. Li koleriĝis pro la perdado kaj diris ke li ponardos kaj marenĵetos al tiu, kiu forportas la viandopecojn. Por kapti la ŝtelanton, la ĉasisto kaŝis sin en la kavarneto kie li stapis siajn viandon.

Post du tagoj, la ĉasisto ekvidis ke pluraj infanoj aperis; ili staris ĉirkaŭ la viandopecoj. La ĉasisto koleriĝis kaj rapide enmanigis sian lancon. Subite li haltis, ĉar li ekkomprenis ke la infanoj estas nordlumaj infanoj, kiuj mortnaskiĝis; tiaj infanoj iris post la naskiĝo al la nordlumo, kie ili dancas kun siaj postnaskaĵoj.

La infanoj klarigis al la ĉasisto ke ili terure malsatis, kaj petegis al li viandon por ke ili daŭre dancu kaj la nordlumoj daŭre brilu. La ĉasisto permesis ke la infanoj laŭbezone prenu viandon.

La infanoj foriris; ilia ĉiela lumdancado daŭris kaj ĝis nun daŭras.

Fonto: A Kayak Full of Ghosts [Kajako Plena je Fantomoj] fare de Laŭrence Millman.

Utilaj vortoj por la vojaĝanto al Pask-Insulo/Rapanui

Jen kelkaj vortoj el la polinezia lingvo de Pask-Insulo aŭ Rapanui. (Ĉu la vortoj estas utilaj aŭ ne estas alia afero.):

kaukau—unuaj manomovoj kaj piedomovoj de nov-naskita infano.

hokohona—lasi por alia tago manĝaĵon jam

kuiritan

hakameroo—ade pruntopreni aĵojn tiel ke la posedanto devas peti ilian

malpruntadon

tingo—tiom pruntopreni aĵojn de unu persono ke restas al li aŭ ŝi preskaŭ

nenio

ngaobera—inflamigita gorĝo pro

kriado

mata ego—okuloj kiuj videbligas ke oni ploris

anga-anga—la penso aŭ sento ke homoj klaĉas pri oni.

Fonto: The Meaning of Tingo and other extraordinary words around the world [La Signifo de Tingo kaj aliaj ekstraordinaraj vortoj ĉirkaŭ la mondo] fare de Adam Jacot de Boinod.

Tribano en la urbo

verkis (s-ro) Jack Davis

(laŭvorta tradukado—la originala rim-aranĝo estas a-b-a-b)

Nigra la nokto kiam mia patrino naskis min

Nigra ŝia doloro por spirigi min

Nigraj la senĉesaj krioj pri mi

Nigra mia ektribaniĝo

Nigra la sono de fremda ridado

Nigra la timotremo pro flustrita vorto

Nigra la kolerego kaj nigra la posta tempo

Nigra la doloro de la petkrio neatendita

Nigraj la tagoj kaj noktoj de marŝado

Nigra la urba soleco

Nigraj la timoj kiuj ĉiam gvatsekvas

En betona sovaĝejo.

Jack Davis estis aŭstrala aborigeno kiu verkis pri indiĝenaj kaj pli ĝeneralaj temoj.

Jen finiĝas la bulteno. Grave rolis en ĉi tiu numero manĝaĵoj, kaj ne nur laŭ la kutima signifo de la vorto. Legantoj de La Kalumeto bone komprenos la rilaton inter veraj manĝaĵoj kaj kultura/mensa/spirita nutrado. Per manĝaĵoj ni povas vojaĝi de la nuntempo al la pasinteco, de la tero al la menso, de polinezanoj al inuitoj. Abundas la tablo kaj la manĝoj—ni ĝuu!

La Kalumeto / Erik Felker, ejfelker@dslextrême.com